

## УРОК 7 – LECIONO 7

### Грамматика – Gramatiko



– **aĉ** – суффикс обозначающий «презрение», «плохое качество»: knabaĉo – плохой мальчик, vivaĉo – дрянная жизнь, babilaĉi – скверно болтать;

– **ar** – суффикс обозначающий собрание однородных предметов или лиц, образующих одно целое: arbo (дерево) – arbaro (лес), vagono (вагон) – vagonaro (поезд), infano (ребёнок) – infanaro (дети), haro

(волос) – hararo (волосы);

– **ad** – суффикс обозначающий длительность действия: marŝi (шагать) – marŝadi (шагать долго), studo (учение) – studado (учёба);

**ĉi** – частица обозначающая близость; она может употребляться вместо **tiu**  
**ĉi**:

tiu **ĉi** taso = **ĉi** taso – эта чашка

tiun **ĉi** tason = **ĉi** tason

tiuj **ĉi** tasoĵ = **ĉi** tasoĵ – эти чашки

tiujn **ĉi** tasojn = **ĉi** tasojn

**ĉi** vespere – этим вечером

**ĉi** semajne – на этой неделе

**ĉi** minuta – сиюминутный

**je** – предлог с неопределённым значением; применяется в тех случаях, когда ни один из предлогов, имеющих определённое значение, по своему логическому смыслу не подходит, но не следует злоупотреблять этим предлогом: malsana je gripo – больной гриппом, inda je rido – достойный смеха, pli peza je tri kilogramoj – тяжелее на три килограмма, je via sano! – за ваше здоровье! Je kioma horo vi tagmanĝas? В котором часу вы обедаете?

**ju (mal)pli ... des (mal)pli** – союзы, которые переводятся на русский язык «чем больше/меньше ... тем больше/меньше». Ju pli ni laboras, des pli bonan rezulton ni havas. Чем больше мы работаем, тем лучший результат мы имеем. Ju malpli li fumas, des pli sana li estas. Чем меньше он курит, тем он здоровее.

### ТАБЛИЦА ВОПРОСИТЕЛЬНЫХ, УКАЗАТЕЛЬНЫХ И НЕОПРЕДЕЛЕННЫХ МЕСТОИМЕНЕЙ и НАРЕЧИЙ

Начальными словообразовательными элементами местоимений являются слова, начинающиеся с **ki**– вопросительно-относительные; **ti**– указательные; **I**– неопределённые;

|                        | <b>ki–</b>            | <b>ti–</b>                                    | <b>i–</b>               |
|------------------------|-----------------------|---|-------------------------|
| лицо или предмет       | <b>kiu</b> – кто      | <b>tiu</b> – тот                              | <b>iu</b> – кто-то      |
| неопределённый предмет | <b>kio</b> – что      | <b>tio</b> – то                               | <b>io</b> – что-то      |
| качество               | <b>kia</b> – какой    | <b>tia</b> – такой                            | <b>ia</b> – какой-то    |
| место                  | <b>kie</b> – где      | <b>tie</b> – там                              | <b>ie</b> – где-то      |
| время                  | <b>kiam</b> – когда   | <b>tiam</b> – тогда                           | <b>iam</b> – когда-то   |
| образ действия         | <b>kiel</b> – как     | <b>tial</b> – так                             | <b>iel</b> – как-то     |
| причина                | <b>kial</b> – почему  | <b>tial</b> – потому                          | <b>ial</b> – почему-то  |
| количество             | <b>kiom</b> – сколько | <b>tiom</b> – столько                         | <b>iom</b> – сколько-то |
| принадлежность         | <b>kies</b> – чей     | <b>ties</b> – того<br>(принадлежащий<br>тому) | <b>ies</b> – чей-то     |

Слова с исходом на – **iu** могут употребляться самостоятельно и принимать окончания – **n** и – **j**. Слова с окончанием на – **io** могут употребляться самостоятельно и принимать лишь окончание –**n**. *Maria rimarkis **iun** en malhela strato.* Мария заметила кого-то на темной улице. ***Iuj** venas, aliaj foriras.* Кто-то приходит, другие уходят. ***Io** subite aperis antaŭ li.* Что-то внезапно появилось перед ним. *Ni lernas **ion** novan ĉiutage.* Каждый день мы учим что-то новое. ***Ie** kantas birdo.* Где-то поёт птица. ***Ial** ŝi ne venis.* Почему-то она не пришла. ***Kies** kajero kuŝas sur la tablo?* Чья тетрадь лежит на столе? ***Kiam** vi aĉetos al mi bombonojn?* Когда вы купите мне конфет? ***Kiel** vi fartas?* Как вы поживаете? ***Tio** estas skribilo.* Это – ручка. ***Tian** historion mi aŭdis de la avino.* Эту историю я слышал от бабушки. *15 eŭroj – **tiom** kostas la florbukedo.* 15 евро – столько стоит букет цветов.

## Задания – Taskoj



*1. При чтении текста «Ombroj en nokto» обратите внимание на значение следующих слов: elektra, efika, eĥi, parko, ŝnuri (ŝnuro), «Chappy», «Whiskas».*

### **Ombroj en la nokto**

Estas la oka post tagmezo. Kies aŭto venis al la parko? Ĝi estas la aŭto de Maksim. Por efika kuracado li decidis preni Miĉjon por nokto en pli varman lokon – en la hejmon de Lena. Miĉjo levas la rostron salute. Oĉjo Boĉjo kviete dormas en sako da fojno. Miĉjo mem eniras en la aŭton, kaj la aŭto forveturas.

Je la dua nokte sub arboj de la parko ekbruis argano. Du ombroj saltis de sur ĝi kaj komencis esplori la parkon.

– Diablo! Mil diabloj! Terura mallumo! Kie dormas tiu ĉi bestaĉo?! – flustris unu ombro.

– Miaŭ! Jen! Jen! – flustris la dua.

– Aha! Jen ĝi ronkas – granda... mola. Ŝnuru ĝin kaj donu al mi la hokon. Atente... Silente! Jen estas la truo. Levu.

– Fino. Ĝi kuŝas en la aŭto. Nun ni fuĝu. Kaj ju pli rapide, des pli bone!



skatolo da  
«Whiskas»

...La aŭto haltis en densa arbaro ĉe bordo de lago. La du ombroj ektumultis apude.

– Atentu, aĉulo! – kriis Krim. – Mi malfermos la kaĝon. Movu, movu pli proksimen... jen, ĉi tie haltu... mallevu... halt! Bone, forprenu la hokon; mi fermos la kaĝon... en ordo.

– Murr...miaŭ! – kontente reeĥis Graf.

Krim viŝis de la frunto ŝviton, donis al Graf skatolon da «Whiskas» kaj mem prenis botelon.

– Nia estos la miliono! Morgaŭ nokte venos submara ŝipo kaj... Je via sano! Kaj nun ni rigardu la bestaĉon pli proksime. Jen – ronkas ĝi nun!

Krim tiris el la poŝo elektran lanternon...

## ***II. Прочитайте и найдите предложения, соответствующие тексту.***

1. Je la oka horo post tagmezo venis aŭto de Krim. Je la oka horo post tagmezo venis aŭto de Maksim.
2. Miĉjo veturos en la hejmon de Lena. Miĉjo veturon en la zooĝardenon.
3. Oĉjo Boĉjo plezure promenas en la parko. Oĉjo Boĉjo kviete dormas en sako da fojno.
4. Nokte ekbruis argano. Nokte ekŝtormis uragano.
5. Kvar ombroj esploris la ĝardenon. Du ombroj esploris la parkon.
6. Graf ŝnuris la bestaĉon. Krim ŝnuris la bestaĉon.
7. «Mil diabloj!» – kontente reeĥis Graf. «Mil diabloj!» – flustris unu ombro.
8. Krim donis al Graf skatolon de «Whiskas». Krim donis al Graf skatolon de «Chappy».
9. Morgaŭ matene venos mara ŝipo. Morgaŭ nokte venos submara ŝipo.
10. Krim tiris el la poŝo elektran lanternon. Krim metis en la poŝon elektran lanternon.

## ***III. Найдите начало следующих предложений.***

- \_\_\_\_\_ li decidis preni Miĉjon por nokto en la hejmon de Lena.  
\_\_\_\_\_ en la aŭton, kaj la aŭto forveturas.  
\_\_\_\_\_ saltis de sur argano.  
\_\_\_\_\_ en densa arbaro ĉe bordo de lago.  
\_\_\_\_\_ la frunto ŝviton kaj prenis botelon.  
\_\_\_\_\_ la bestaĉon pli proksime.

## ***IV. Расставьте в нужном порядке пункты плана прочитанного текста.***

Revoj de Krim. Ĉe bordo de lago. Je la dua horo nokte. Alveno de Maksim. Nokta festeno kun «Whiskas» kaj botelo. Forfuĝo kun «la bestaĉo». Forveturo de Miĉjo.

## V. Перескажите текст, опираясь на следующие слова:

aŭto – parko – Maksim – Miĉjo,  
nokto – oĉjo Voĉjo – sako da fojno,  
parko – argano – du ombroj,  
mallumo – bestaĉo – aŭto,  
arbaro – bordo de lago – kaĝo,  
Krim – botelo – Graf – «Whiskas»,  
miliono – bestaĉo – submara ŝipo.

## VI. Внимательно ознакомьтесь с таблицей в грамматической части урока.



1. Ответьте на вопросы, употребляя указательные слова.

Пример: **Kiu** knabino bele kantas? **Tiu** knabino bele kantas.

Kio estas interesa? Kia jupo estas longa? Kies ĝardeno estas eksterurbe? Kie li estas? Kien ŝi iras? Kiam ni dormos? Kiel vi fartas? Kiom pezas la mamutido?

2. Переведите, обращая внимание на употребление вопросительных слов.

Что это? Это – парк. Что вы делаете? Сколько детей играет во дворе? На каком стуле он сидит? – Он сидит на том стуле, который стоит у окна. Что в этой книге? – В этой книге то, что и в другой книге. Куда ты едешь? Какой Вы человек? Где стоит дом? – Дом стоит там. Я сделал столько, сколько я смог. Почему ты плачешь? Чей ботинок?

## VII. Прочитайте предложения.

1. Переведите, объясняя значение суффиксов **-ad-**, **-aĉ-**.

Se ofte ridaĉi, mankas tempo por maĉi. Antaŭ tagmezo mi lernadas. La lernado estas interesa. La aĉetado de ŝuoj daŭris la tutan horon. Ĉi hundaĉo vagas sola. Mi ne ŝatas tiun ĉi kaĉaĉon. Kiu estas aĉa junulo? Kiu ludados kun infanoj? Ili restadis en kuraĉloko. Feliĉe la kantaĉo daŭris nelonge.

2. С помощью суффикса **-ar-** образуйте новые слова и переведите их: arbo, delegito, homo, junulo, kampo, vorto.

3. Составьте письменно по 2 предложения со словами, содержащими суффиксы **-aĉ-**, **-ad-**, **-ar-**.

4. Выучите наизусть четверостишие венгерского писателя István Szerdahelyi.

**F**ihomo, se estas  
morala difekt'.  
**H**omaĉo, se ŝokas  
malplaĉa aspekt'.



Istvan Szerdahelyi

**VIII. *Прочитайте и переведите следующие предложения. Обратите внимание на употребление частицы ĉi.***

Mi ne legis tiun ĉi libron. Tiu ĉi knabino estas bela. Kiu venas ĉi tien? Ĉi jara vintro estis varma. Ĉi tiuj gelernantoj estas diligentaj. Ĉi tion vi ne manĝu! Ĉi matene mi ne gimnastikos. Ĉi homo estas honesta. Ĉi pomoj estas bongustaj.

**IX. *С помощью словаря переведите следующие выражения и запомните их. Составьте предложения с некоторыми из переведенных выражений:***

поднять хобот, поднять шум, поднять на смех, поднять флаг, поднять крик, поднять зарплату, поднять тревогу, поднять вопрос.

**X. *Составьте письменно предложения, правильно соединив части А и В.***

| <b>A</b>                       | <b>B</b>                                    |
|--------------------------------|---|
| Ju pli mi lernas               | des pli vi estas trankvila.                 |
| Ju malpli vi riskas            | des pli li ŝatas aŭdi ĝin.                  |
| Ju pli li aŭskultas la muzikon | des pli malmulte oni gajnas.                |
| Ju pli suno brilas             | des pli mi komprenas, ke mi malmulte scias. |
| Ju malpli oni laboras          | des pli la naturo reviviĝas.                |

**XI. *Прочитайте и переведите следующие пословицы и поговорки. Дайте их русский эквивалент.***

**Ju pli** granda la deziro, **des pli** kara la akiro.

**Ju pli** frua veno, **des pli** bona preno.

**Ключи к заданиям – Ŝlosiloj al la taskoj**

*Задание VI – Tasko VI*

2) Kio ĝi estas? – Ĝi estas parko. Kiom da infanoj ludas en korto? Sur kiu seĝo li sidas? – Li sidas sur tiu seĝo, kiu staras ĉe fenestro. Kio estas en tiu ĉi libro? – En tiu ĉi libro estas tio, kio estas en alia libro. Kien vi veturas? Kia homo Vi estas? Kie staras domo? – Domo staras tie. Mi faris tiom, kiom mi povis. Kial vi ploras? Kies estas boteto?

*Задание IX – Tasko IX*

поднять хобот – levi rostron, поднять шум – fari bruon, поднять на смех – ridindigi, поднять флаг – hisi flagon, поднять крик – ekkrii el la tuta gorgo, поднять зарплату – plialtigi salajron, поднять тревогу – krei alarmon, поднять вопрос – levi demandon

*Задание X – Tasko X*

1. Ju pli mi lernas, des pli mi komprenas, ke mi malmulte scias.

2. Ju malpli vi riskas, des pli vi estas trankvila.

3. Ju pli ŝi aŭskultas la muzikon, des pli ŝi ŝatas aŭdi ĝin.

4. Ju pli suno brilas, des pli la naturo reviviĝas.

5. Ju malpli oni laboras, des pli malmulte oni gajnas.